



# LINGVO INTERNACIA

Monata gazeto por la lingvo Esperanto.

**Kosto de abono por jaro:** Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugalaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

**Pago por anoncoj:** 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duonpaĝa, petitlinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administrado: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarorszáĝ (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

## Raporto

de la Arĥangelska filio de l' S.-Peterburga Societo „Espero“  
por la jaroj 1898—99 ĝis la 1-a de januaro 1900.

### Kopio.

En sekvo de klopodoj de kelkaj personoj loĝantaj en Arĥangelsk, kaj nome s-roj Ĉulkov, Sokolov, Ignatov, Zakrjevski, Starcev kaj sinjorino Revaldt, per sinjoro loka guberniestro la 23-an de oktobro 1898 estis donita la permeso malfermi en Arĥangelsk filion de la S.-Peterburga esperantista Societo „Espero“ por disvastigado de la lingvo Esperanto, kies celo estas faciligi la internacian interkomunikon.

La malfermo de la filio efektiviĝis je la 21-a de novembro de tiu sama jaro en salono de l' Arĥangelska magistrato. En la malfermo de la filio krom la membroj-fondantoj apudestis multe da gastoj.

En la komenco de l'unua komuna kunveno, laŭ la propono de l' prezidanto

de la kunveno, unu membro-fondanto s-ro N. Ĉulkov tralegis paroladon, en kiu li konatigis la apudestantajn gastojn kun la celoj de la malfermata Filio, kun la lingvo Esperanto mem, kun la diversaj provoj krei artan internacian lingvon kaj, fine, kun la diversaj opinioj pri Esperanto, de eminentaj personoj; tiu ĉi parolado estis presita en la gazeto „Arĥangelskija Gubernskija Vjedomosti“, kaj poste eldonita en apartaj broŝuretoj per la parolinto mem.

En la raporta jaro la filio havis du komunajn kunvenojn; en la unua kunveno je la tago de la malfermo de la filio estis decidita la sekvanta: estis difinita la mezuro de l'membra pago por la membroj efektivaj 2 rubloj kaj por la membroj-helpantoj 50 kop.; poste estis elektitaj kiel efektivaj membroj, laŭ donitaj petskriboj, s-roj Ivanovski kaj Rukin, kaj fine estis elektita la komitato de filio, en kiu eniris:

s-roj A. Zakrjevski, N. Ĉulkov, V. Sokolov, F. Ŝilov, V. Ignatov kaj A. Ivanovski.

La dua komuna kunveno estis difinita je la 7-a tago de marto, sed en sekvo de neapudesto de necesa nombro da membroj estis prokrastita ĝis la 14-a tago de tiu sama monato, kiam ĝi do efektiviĝis en la loĝejo de sinjoro prezidanto. En tiu ĉi kunveno, post la elekto kiel membro-helpanto s-ron Nekrasov, la prezidanto proponis al la kunveno malfermi en Arĥangelsk publikajn kursojn pri Esperanto, sed tiu ĉi demando, en sekvo de nekonfido de l'membroj, estis prokrastita ĝis la sekvanta kunveno; fine estis elektita sekretario de filio s-ro Ignatov anstataŭ s-ro Ĉulkov, kiu laŭ donita raporto ne povis daŭrigi la oficon de sekretario en sekvo de manko da libera tempo.

Kunsidoj de l'komitato en la raporta periodo estis kvin: unua — 27 jan. 1899, dua — 8 febr., tria — 7 marto, kvara — 17 okt. kaj kvina 17 nov., kiuj fariĝis en la loĝejo aŭ de l'prezidanto aŭ de la sekretario.

#### *Kapitalo de la Filio:*

Enspezoj. Membraj enportoj 19 r. 60 kop., oferoj 2 r. 39 kop., puraj profitoj el la vendado de lernolibroj 5 r. 62 kop. Kune 27 r. 61 kop.

Elspezoj. Por la lernolibroj, regularoj kaj adresaroj 9 r. 55 kop., unu ekz. de l'gazeto „L. I.“ 1 r., poŝtaj elspezoj 3 r. 90 kop., blanketoj, kovertoj, sigelilo 9 r. 70 kop. Kune 24 r. 15 kop.

Al la 1-a de januaro de l'jaro 1900 en la kaso de la filio restis 3 rubloj 46 kopekoj.

Membroj de la Filio: a) efektivaj membroj: 1) Zakrjevski A. K., 2) Ivanovski A. V., 3) Ignatov V. M., 4) Rukin P. N., 5) Revaldt A. M., 6) Sokolov

N. I., 7) Starcev N. A., 8) Ĉulkov N. O., 9) Ŝilov F. K., 10) Uljanov N. A.;

b) membroj korespondantoj: 11) Eliina Zabilon d'Her (Francujo, Lyon), 12) Nekrasov A. O.;

c) membroj helpantoj: Amosov P. A. kaj 14) Pilecki V. M.

Kompreneble, ke kun tia malgranda nombro da membroj kaj malgrandaj rimedoj, la filio ne povis larĝe disvolvi sian agadon, kaj nur penadis konatigi la loĝantojn de Arĥangelsk kun siaj celoj kaj kun la neceseco enkonduki la uzadon de lingvo internacia, por kio iam post iam estis lokitaj anoncoj kaj artikoloj, dediĉitaj al Esperanto, en la loka gazeto; estis dissenditaj kaj disdonitaj senpage broŝuroj pri la lingvo Esperanto; estis aranĝita vendado de lernolibroj kaj aliaj Esperantaj libroj en la loka librovendejo de sinjoro Ŝaŝkovskoj, kie estis venditaj en la daŭro de l'1899-a jaro 100 lernolibroj.

En la daŭro de la vintro de l'1899-a jaro por la membroj de la filio estis aranĝitaj du praktikaj vesperoj por praktikado en buŝa parolado en la lingvo Esperanto.

La filio abonadis en la jaro la gazeton „Lingvo Internacia“; krom tio estis fondita la biblioteko de l'filio per oferado de diversaj esperantistaj libroj de s-roj Zakrjevski, Ignatov kaj Pilecki.

Ĉe la filio estis agento por la disvastigado de la lingvo Esperanto; la oficon de agento plenumis la prezidanto. Li donadis senpage lecionojn de Esperanto al ĉiuj dezirantaj ellerni nian lingvon, disdonadis senpage broŝurojn kaj lernolibrojn de la lingvo kaj donadis senpage por legado kaj trarigardo diversajn Esperantajn librojn.

Kun la originalo kontrolis la prezidanto Aleksandro Zakrjevski.

Adreso de la Filio: Rusujo. Arĥan-

gelsk. Filio de Societo „Espero“. Troickij prospekt, domo de Popovoj.

P. S. Komencante de februaro de la nuna jaro, la membroj de la filio komencis deiradi, kaj en la nuna tempo la filio sin trovas en tre malĝoja situacio; tial la prezidanto sin turnas en la nomo de la filio al ĉiuj esperantistoj, precipe rusaj, helpi al la filio aĉetante la eldonon de la filio „malgrandan gramatikon de Esperanto“ — kosto 1 kop. — aŭ oferi ian sumon, ĉar la filio ŝuldas al diversaj presejoj en Arĥangelsk — 50 rublojn, en la kaso de l' filio do estas neniom da mono.

A. Z.

## PRI LA VERBIGILO Ī.

En la n-ro 12 de „Lingvo Internacia“ de 1896 mi lokis artikolon „Verbigo de adjektivoj per la sufikso ĭ.“ Kvankam de tiu tempo pasis multege da monatoj, tamen ĝis hodiaŭ nur unu esperantisto volis honori ĝin per sia kritiko: estas vere, ke tiu esperantisto estas eble la plej estiminda kaj brilanta talento en la Esperantujo, kaj tiu ĉi cirkonstanco iom konsolas min en la silentado de aliaj amikoj esperantistoj.

Ĉar tamen la ideo, kiun mi disvolvis en tiu artikolo, ne trovis la deziratan konfeson, mi pensas ke estus bone klarigi la demandon pli detale.

La ideo de la dirita artikolo estas la sekvanta: ĉia adjektivo povas doni verbon per la sufikso ĭ, ekz.: aroganta — aroganti (esti aroganta), blanka — blanki (esti blanka), ruza — ruzi, avara — avari k. c.

La kontraŭopinio estas jena:

1. Tiaj verboj ne povas ekzisti, ĉar la ĭ de l' infinitivo ne havas la sencon „esti“.

2. Se ni allasus tian signifon al la finaĵo ĭ, t. e. se la lasta signifus „esti“, tiam la finaĵoj *as*, *is*, *os* k. c. devus havi la sencon „estas“, „estis“, „estos“ k. c.:

en tia okazo ni havus la rajton diri „mi as“ anstataŭ „mi estas“, sekve *i*, *as*, *is* estus abreviaturoj de „esti“, „estas“ k. c.

3. La sekvo de la punkto 2. estus ke ni havus la eblon diri: „mi viras“, „mi servantas“, „mi oficiras“ anstataŭ „mi estas viro, servanto, oficiro“; de alia flanko, se en la frazo „mi ruĝas“ la finaĵo *as* egalus al *estas*, kial la sama finaĵo *as* havas alian signifon en „mi manĝas“? Por ke *as* havu tie ĉi la saman signifon, la lasta frazo devus signifi „mi estas manĝo“, kiu estas absurdo.

Analizante l' unuan punkton, mi rimarkas ke tiaj verboj povas ekzisti, kaj ili efektive ekzistas. En „L' Espérantiste“ de majo 1900 mi trovas l' adjektivojn *kuraĝ*, *avid*, *egal*, *avar* k. c., kiuj laŭ l' opinio de l' aŭtoro povas tre bone fariĝi verboj per la simpla aldono de *as*, *is* k. c. al la respondantaj radikoj, kaj tiuj ĉi verboj signifas, laŭ la konfeso de l' aŭtoro, „esti kuraĝa“, „esti avida“ k. c. Nun mi demandas: kial la suprediritaj adjektivoj prezentas escepton inter aliaj? Mi ne trovas la kaŭzon. Ke tiu ĉi privilegio tute ne ekzistas, ŝajne pravas la „Plena Vortaro rusa-esperanta“ de d-ro Zamenhof, kiu donas ekzemple tiajn verbojn: gaji (paĝo 15), rapidi (p. 192), perfidi (p. 65), malkvieti (p. 13), lami (p. 220), ruzi (p. 219). Tiaj ĉi radikoj figuras en la Universala Vortaro kiel puraj adjektivoj. Komparu ankaŭ: „Tri palmoj fieris per kresko gracia“, M. Solovjev („Esperantisto“ 1893, paĝo 85, strofo 1). — „Poste la juĝisto rapidis hejmen“, L. E. Meier („Esp.“ 1893, paĝo 183, linio 6 de sube). — „Profunde sub ni sur la tero verdanta, bluanta sur mar' . . . moviĝas malĝojoj“, Otto Zedlitz („Lingvo I.“ 1895, paĝo 11). — „La maljunulo eklevis sian rigardon kaj kontentis

vidi sian liton“ . . . Paul Nylén („Lingvo Internacia“ 1897, paĝo 166, linio 15 de sube). — „En van' nun *maltrankvilas* vi“, S. Agrell („L. I.“ 1899, p. 62). „... homoj sinforĝeseme ŝargintaj sin je administro de nia ĵurnaleto *indas* nur nian dankon“, A. Z. („L. I.“ 1898, p. 5, l. 20 de sube).

La montritaj ekzemploj pruvas, mi esperas, ke da tiaj verboj ekzistas granda kvanto: almenaŭ nombro pli konsidera ol estas donita de l'maja n-ro de „L'Espérantiste“. Mi tamen ne donos aliajn ekzemplojn, ĉar mi deziras nur pruvi la justecon de l'starigita ideo, sed ne prezenti tie ĉi vortaron de verbigitaj adjektivoj.

De l'supredirito sekvas ke la montrita motivo de l'nebleco de tiaj verboj, scie ke la *i* de l'infinitivo ne havas la sencon „esti“, falas per si mem.

Estas vere ke nenie, nek en la lernolibro de d-ro Zamenhof nek alie mi trovis formalan diron, ke *i* havas tian signifon. Sed, ke la dirata signifo ekzistas, oni povas ankaŭ vidi de l'sekvanto. En la „Plena Vortaro“ mi trovas la verbon „gaji“, sed tie ne troviĝas la kunmetita formo „esti gaja“, tamen en la sama Vortaro oni povas vidi la verbon „esti malgaja“ (p. 35). Kion, en tia okazo, signifas „i“, se ne „esti“? En la „Plena Vortaro“ troviĝas la formo „esti malsana“ (p. 11), kaj en la „Ekzercaro“ (p. 43) la verbo „sani“ (apud „sanigi“ kaj „saniĝi“). Mi pensas ke la pruvo estas plena.

Nun sekvas la punkto 2. Se ni allasos tian signifon al la finaĵo „i“, — diras la kontraŭopinio, — la sufiksoj *i*, *as*, *is* k. c. prezentos mallongigon de *esti*, *estas* k. c. Mi devas diri, ke tio ĉi estas plena vero, sed mi tie ĉi vidas nenian maloportunecon. Se ĝis nun la esperantistoj preskaŭ ne uzis tian formon, tio ĉi nenion

montras: ili povas ĝin trankvile uzi kiel la angloj uzas *I'll* anstataŭ *I will* kaj *you're* anstataŭ *you are*. La ekzemplo estas jam donita: en „L. I.“ 1898 mi trovas sur la paĝo 5 (22-a linio de sube) la sekvantan frazon de A. Z.: „Tial Dio gardu nin rilati nin al ĉiuj haltigoj redakciaj, *intaj* kaj *ontaj*, eĉ kun ombro de riproĉo.“ Se „inta“ kaj „onta“ signifas tie ĉi „estinta“ kaj „estonta“, kaj tion ĉi ili absolute signifas, tiam *i* signifas *esti*, *as* = *estas* k. c.

Farante ĝeneralan noticon pri la supredirita por pli oportune pasigi al la sekvanto, mi diros, ke se ni allasas ke la finaĵoj *i*, *as* k. c. esprimu nur verban modon kaj tempon, ni samtempe diras ke, aldonitaj al adjektivaj radikoj, ili signifas *esti*, *estas* k. c. Unu kondiĉigas l'alian. Mi proponas la sekvantan temon: estas donita eco aŭ stato, nomata „verda“; en tiu ĉi stato troviĝas arbo kaj scie en la nuna tempo. Kiel esprimi ke la arbo sin trovas en tia stato, evitante la formon „la arbo estas verda“? Por kontentigi l'unuan kondiĉon de la temo, ni devas preni la radikon „verd“; por kontentigi la duan, ni devas aldoni verban sufikson de tempo estanta, kaj tio ĉi estas *as*. En la rezultato ni ricevas: *verdas*. La temo estas solvita.

Etendante la diriton sur ĉiujn adjektivajn adjektivojn, mi rimarkos, ke, ĉar diversaj adjektivoj esprimas diversajn ideojn: staton, econ, kuron aŭ movon de ia eco (tamen ĉiam staton aŭ econ), iliaj verboj ricevas apartajn nuancojn, kiuj dependas de la radiko: la verbaj finaĵoj montras nur, ke la vortoj estas verboj en difina modo kaj tempo; „kuraĝi“ = *esti* kuraĝa, sin montri kuraĝa, sin distingi per kuraĝeco, montri kuraĝon k. c. Por ĉia adjektivo kaj por ĉia aparta okazo unu nuanco estas pli densa ol alia. Krom tio, la senco de la dirataj



verboj estas ankoraŭ limigita per la sufiksoj *ig* kaj *iĝ*. Neniu intermiksos *lami*, *lamigi* kaj *lamigi*.

El tio ĉi sekvas, ke oni tre bone povas diri: „mi viras, mi oficiras, mi advokatas“ en la senco „mi estas viro, oficiro, mi plenumas la oficon de advokato“ . . . ĉar tiaj substantivoj esprimas staton aŭ econ de profesio, de karaktero k. c. \*) El tio ĉi fine tute ne sekvas ke „mi mangas“ = „mi estas mangô“, — ĉar „mangô“ estas nek eco nek stato. Oni ne povas diri: „mi estas mangô, mi estas skribo“, kiel oni ne diras: „mi estas rapido, mi estas bono“, sed oni povas tre bone diri: „mi estas manganta, mi estas skribanta“, kiel oni diras: „mi estas rapida, mi estas bona“.

A. Kofman.



## EL ŜEVĈENKO.

1.

Larĝan valon, altan tombon  
En vespera hor',  
Ĉion, kion ni parolis,  
Kion revis, kion volis —  
Ne forgesas kor'.

Sed ĉu bonas neforgeso?  
Ni ne estas kune nun;  
De hommalboneco baroj  
Nin disigis . . . Pasis jaroj,  
Pasis nia jun'.

\*) „Ili trinkas — tamen ne akvon, promenas malmulte, amistas sole pasante.“ E. de Wahl, „Princidino“, p. 4.

Estas mi en mallibero,  
Estas vi vidvin' . . .  
Ni nur marŝas sur la tero,  
Ni ne vivas; kiel vivis —  
Ni nun songas ĝin.

2.

Kial mi suferas? kial mi doloras?  
Kial ploras, ĝemas, krias mia kor'?  
Infanet' malsata tiel laŭte ploras . . .  
Kion, kor', vi volas? je kio dolor'?  
Ĉu vi volas mangi, dormi, kor' sufera?  
Dormu vi! Ho, dormu, infan'-suferul'!  
Frenezu ĉirkaŭe la homo kolera . . .  
Kor', fermata estu via par'okul'.

3.

Malamikaj estas bonaj  
Pli ol „bonaj homoj“,  
Kiuj vokas vin kunmang'i  
En gastamaj domoj.

Bedaŭrante ili trompas,  
Kunplorante mokas,  
Ili, por kondamni, ridi,  
Konfeson elvokas.

Malamikojn, iafoje,  
Ne donas la sorto;  
„Bonaj homoj“ estas ĉie,  
Ili do vin ne forgesos  
Eĉ post via morto.

S. Sviridov.



## Eraro.

Unutage vilaĝano portis korbom da piroj al la kastelo de granda sinjoro. Li alvenas al la kastelo, kaj en la ŝtuparo li renkontas du simiojn, kiuj estas vestitaj

kiel infanoj, kun ĉapelo sur la kapo kaj malgranda glavo apud la flanko.

Kiam la vilaĝano ilin vidas, li deprenas sian ĉapelon; la simioj alproksimiĝas al la korbo kaj komencas manĝi la pirojn. La vilaĝano nenion diras, kaj la simioj ŝtelas grandan parton da liaj piroj. Poste la vilaĝano suprenpaŝas al la sinjoro.

— Sinjoro, — li al tiu diras, — jen tiuj piroj, kiujn de mi vi mendis.

— Estas tre bone, — la sinjoro diras, — sed via korbo estas ja duonmalplena; pro kio vi ĝin ne plenigis?

— Ĝi estis tute plena, sinjoro, — la honesta homo diras, — sed en la ŝtuparo mi renkontis *viajn du filojn*; tiuj sinjoroj trovis la pirojn laŭ sia gusto, kaj mi ne kuraĝis ilin al ili rifuzi.

Tradukis el franca lingvo

David Hermansson.



## Esperantistoj aktivaj kaj pasivaj.

Unu el niaj abonantoj, kiu nomas sin per la pseŭdonimo Arero, sendis al ni la sekvantan artikolon. Ni aprobas la celon de Arero, sed ni dubas, ĉu la rimedo, kiun li rekomendas, estus oportuna. Jen sekvas la artikolo:

### 4000.

Varbi novajn anojn estas tre bone, sed estas necese ankaŭ, ke la varbitaj restu kun ni kaj ke ili fariĝu efektive Esperantistoj. Oni povas diri preskaŭ sen eraro, ke veraj esperantistoj estas abonantoj de „Lingvo Internacia“. Tiel ni estas plej multe 500. Tamen niaj adresaroj enhavas

jam almenaŭ 4500 nomojn. Kredeble tiuj 4500 personoj estas bona materialo por nia afero, se ne, iliaj nomoj ne estus en la Adresaro. Tial ni devas zorgi altiri ilin fine al nia movado, ĉar se ni forlasos la amikojn de nia ideo, ili forlasos nian ideon. Por tio ĉi ne estus senutile memori al la enskribitoj en la Adresaro pri nia ekzistado. Ni skribu al ili alvokon. Ni diru, ke ili ĉiuj povas ankaŭ helpi nin en la laborado, ke ilia devo estas aliĝi al nia movado, ĉar oni ne havas rajton forlasi amikojn senhelpe. Ni diru ankaŭ, ke neniu devas pensi: „oni venkos sen mi, sen unu homo“, — ĉar povus alveni al ĉiuj aŭ almenaŭ al multaj tiel strange kalkuli kaj la afero suferus nur pri tio.

Tie ĉi mi volas nur diri kion pli malpli devus enhavi la alvoko. Ni diru, ke laŭ la Adresaroj ni estas almenaŭ pli ol 4000, ke ni persiste petas la helpon de ĉiu enskribita, ĉar se ĉiu el ni aliĝos al la agado, ni estos sendube 4000, kaj se ni estos 4000 unuigitaj, oni parolos pri ni, oni venos pli volonte al ni — nia ideo, nia lingvo estos pli rapide disvastigota. Ni diru, kiel oni povas efike helpi Esperanton, kiel oni povas plej rapide kaj plej bone ellerni la lingvon kaj ni donu klarigojn koncerne niaj lernolibroj, vortaroj, gazetoj, societoj aŭ kluboj. Ni diru, ke niaj libroj povas esti alvenigitaj per ia ajn librejo se oni nur donu la titolon de l' verko, la lokon, en kiu ĝi estas eldonita kaj la nomon de l' eldonanto. (La publiko ne amas kaj ne volas skribi, sendi poŝtmarkojn k. t. p.)

Tiu ĉi alvoko devus esti skribota krom esperante ankaŭ en kelkaj naciaj lingvoj. Tiu el la esperantistoj, kiu redaktu tian alvokon Esperante, sendu ĝin al la Redakcio por ke ĝi estu enpresota en la

gazeto. Esperantistoj de diversaj nacioj tradukos ĝin en siajn lingvojn kaj sendos la tradukojn al la Administrado de „Lingvo Internacia“ por ke oni ilin presu.

La presajo povus kosti nenion, — oni oferus por tio unu numeron de „Lingvo Internacia“. La abonantoj kredeble ne murmuros, — tio estos por la propagando. Mi pensas, ke du paĝoj sufiĉos por presi per tre malgrandaj literoj la tutan alvokon en 5 aŭ 6 lingvoj. Ĉar la numero de „L. I.“ konsistas el 16 paĝoj, ni havos el unu ekzemplero 8 alvokojn, kaj, ĉar nia organo estas sendube presata en 500 ekzempleroj, ni multigante 8 per 500 ricevos ĝuste 4000 alvokojn. Tia nombro sufiĉos, ĉar al la nunaj abonantoj ne estas necese sendi alvokojn.

La transsendo de unu alvoko kostas 5 centimojn kaj la transsendo de 4000 alvokoj — 200 frankojn. Mi proponas, ke ĉiu nuna abonanto volu pagi unu frankon por tiu celo. Se mono restos, oni ĝin metos en la kapitalon de d-ro Zamenhof. Ĉar la transsendo de la mono kostas, ni sendu tiun ĉi frankon kune kun la abonpago por la venonta 1901-a jaro, kaj ni sendu tiun ĉi monon plej rapide, ni sendu ĝin tuj al la Administrado de „L. I.“ — Faru tion ĉi, tio estas por nia kara lingvo, por nia ideo, Samideanoj! Kaj memoru la proverbon: Duoble donas, kiu tuj donas.

*Arero.*

\*

Ĉu tia cirkulero efektive donas la rezultaton atenditan? Ni ne kuraĝas tion esperi. Eble unu procento atentus ĝin. Se ni aranĝus la cirkulerojn por gajni al nia afero tiun solan procenton, ĉu do la cirkuleroj estus fareblaj laŭ la programo de Arero? Kredeble ne; ĉar la plimulto de la personoj, al kiuj la cirkulero devus esti

sendota, estas rusoj, sed nia presejo ne havas rusajn literojn. La gazeto „L. I.“ ankaŭ ne estas la plej oportuna loko por tiu ĉi afero. Ju pli oni lasas al la redakcio kaj administrado zorgi nur por la aparta laboro de la gazeto laŭ la temo kaj celo mem de la gazeto, des pli ili povas sur sia kampo agadi por la bono de nia ideo. Sed ekzistas ja multaj aliaj aktivaj esperantistoj, kiuj povos aranĝi ion similan al tio, kion projektas Arero.

Kvankam ni pensas, ke oni devas kaj povas ion fari por la aligo efektiva de la „4000“, ni tamen ne povas tute aprobi la supre cititan projekton en ĝia nuna formo; kaj ni petas la legantojn, ke ili **ne** transsendu nun al la redakcio monon por la celo de tiu ĉi tute nematura projekto.

Pro la espero, ke unu aŭ alia povos ĉerpi novajn ideojn kaj iniciativojn el tio ĉi, ni presis ĝin kune kun nia propra opinio.

La redakcio.

---



---

## KRONIKO.

### EL BULGARUJO.

— S-ro H. Popov en Tirnovo, Dol-Orehovitzo, sciigis nin, ke la bulgara ilustrita revuo „Rodina“ en la folietoj II—III kaj V—VI enhavas tre bonajn artikolojn pri Esperanto, verkitajn de li, kaj ke Esperanto bone sukcesas en Bulgarujo.

\*

— En n-ro 29 de la gazeto „Plovdiva Eho“ estis enpresita tre longa artikolo, verkita de s-ro Popov, pri l' agado de la Societo p. p. Esperanto en Épernay kaj pri la fervora agado de s-ro profesoro Méray en Dijon.

## EL FRANCUJO.

— S-ro Elbèr No havis la bonecon sendi al ni n-ron 861 de P „Journal de la Santé“ (8. VII), kiu enhavas la trian de la serio da artikoloj verkitaj de s-ro Henri Bel por la dirita kuracista gazeto.

Ni ne povas rifuzi al ni citi unu diron, kiun faris s-ro Bel, malpravigante la kontraŭulojn, kredigantajn ke Esperanto estus malriĉa lingvo. „El la vidpunkto matematika,“ diras li, „se ni kombinus ĉiamaniere la 900 radikojn de la vortaro 2-ope kaj 3-ope, ni atingus preskaŭ la nombron de 730 milionoj da vortoj!! Kompreneble la plimulto da ili ne prezentus ian sencon; sed superrestas malgraŭ tio sufiĉe por formi la kelkaj miloj da vortoj, en kiuj konsistas la spirita pakajo de homo tre klera.

\*

— **Societo por la propagando de Esperanto.** La 21-an de julio la Komitato de S. p. p. Esperanto kunvenis Parizon kaj kunsidis en la restoracio de la Hotelo de la Societoj Sciencaj. Kelkaj tre interesaj demandoj tiam estis esplorataj kaj deciditaj.

*La kunveno kun vespermanĝo*, pri kiu ni anoncis en nia antaŭa n-ro, havis lokon tuj post la kunsido de l' komitato. Ĉeestis s-ro L. de Beaufront, prezidanto; gesinjoroj Samuel Meyer (de La Rochelle), s-roj Clarence Bicknell (de Bordighera), Démarrest, Lundberg (de Malmö, Svedujo) alkondukita de s-ro Démarrest, Fréhis, Gabriel Chavet kaj René Lemaire. La vespermanĝo estis tre gaja kaj tre interesa; kaj la kunestantoj nur bedaŭris la foreston de multaj amikoj, kiujn ili esperis havi.

En la fino de la vespermanĝo, s-ro de Beaufront komunikis telegramon de s-ro Ostanieviĉ, prezidanto de l' Societo Espero, kun diversaj leteroj de la Societo Espero, de s-roj Henri Bel, Laisant, Frederiko Brych (militista intendanto en Josefstadt), esprimantaj ilian bedaŭron ke ili ne povis veni kaj ilian amikan saluton al la esperantistoj ĉeestantaj.

S-ro de Beaufront poste konigis la rezultatojn de la 1-a konkurso literatura de la Societo p. p. Esperanto.

„Ni ne devas forgesi,“ diras s-ro René Lemaire en sia raporto en „L'Espérantiste“, „ni ne devas forgesi diri, ke la kunmanĝantoj memoris pri la modesta kaj glora eltrovinto, al kiu ili dankas la komunan ligilon kiu kunvenigis ilin, kaj ke tiu ĉi ĉarma kunveno finiĝis nur post tosto de s-ro de Beaufront al Doktoro Zamenhof.“

*La aliaj du kunvenoj*, la 9-an de aŭgusto kaj la 6-an de septembro, estas forlasitaj.

Ni citas pri tio ĉi la vortojn de l' sekretario René Lemaire en la organo de S. p. p. Esperanto:

„Raportinte pri tiu unua kunveno kaj esprimante nian tre varman dankon al tiuj kiuj venis — kelkaj de tre malproksime — por partopreni en ĝi, ni devas tre sincere konfesi, ke ni esperis esti multe pli multaj. Kunokazo de bedaŭrindaj kaŭzoj — vojaĝoj aŭ malsanoj — senigis nin je la plimulto de niaj plej bonaj esperantistoj Parizaj. Aliparte, la amikoj fremdaj, por kiuj speciale ni aranĝis tiujn kunvenojn, ne venis: unuj nenian motivon donis, la aliaj forlasis sian intencon viziti la Ekspozicion. Oni konfesos, ke ni estis pravaj ne aranĝante la kongreson, la oficejon k. t. p., kiujn oni petis de ni, ĉar vere ni estus tiel perdintaj multe da klopodado



kaj mono. Ni efektive scias, ke oni ne faras ĉiam, kion oni volas, kaj ni vere timis, ke multaj, kiuj esperis veni Parizon, ne povos poste efektiviĝi sian projekton. La sciigoj, kiujn ni havas, ne permesas al ni esperi, ke la afero estos alie en la monatoj aŭgusto kaj septembro; kaj estos ankoraŭ pli malfacile en tiuj epokoj kunveni la esperantistojn Parizajn, el kiuj preskaŭ ĉiuj kutimis en tiu tempo foriri en la „provincon“. En tiaj kondiĉoj, la Komitato, per speciala voĉdono, juĝis ke estas pli saĝe forlasi tiujn kunvenojn; sekve ĝi konigas al la Esperantistoj, ke la vespermanĝoj anoncitaj por la 9-a de aŭgusto kaj 6-a de septembro ne efektiviĝos, kaj ĝi diras al ili „je l' revido“ ĝis ia pli favora cirkonstanco, kiu donos al ni la eblon refari — sed pli grandanombre — la agrablan vesperkunvenon de la 21-a de julio.

\*

— **Max Müller kaj Esperanto.** La Societo Espero akiris de la granda lingvisto ke li konsentis esti membro honora de ĝi. S-ro L. de Beaufront petis lin, ke li faru la saman favoron al la S. p. p. Esperanto, konsentante fariĝi membro de ĝia Honora Komitato. S-ro Max Müller akceptis, esprimante al s-ro de Beaufront sian plej bonan deziron por la sukceso de la Societo p. p. Esperanto. Ĉiuj niaj amikoj ĝojos pri tiu granda provo de simpatio por Esperanto, kiu substrekas la opinion tre precize favoran, jam antaŭe eldiritan de s-ro Max Müller pri la lingvo internacia Esperanto.

\*

— **Societo Espero en la Ekspozicio.** La Komitato de la S. p. p. Esperanto, decidinte antaŭe, ke ĝi helpos la Societon Espero por ĝia ekspozicio, akcep-

tis en sian kalkulon la elspezon da 66,60 fr., kiun s-ro René Lemaire faris por la aranĝo kaj ornamo de la ekspozicio de la Societo Espero.

\*

— **Juĝoj, aliĝoj kaj faktoj rilataj al la lingvo Esperanto** estas la titolo de propaganda folio, kiun la S. p. p. Esperanto decidis eldoni en franca lingvo. La uzo de ĝi estas rekomendata speciale kontraŭ la profesoroj kaj scienculoj.

\*

— **Konkurso Literatura en Esperanto.** La S. p. p. Esperanto malfermas sian 2-an konkurson literaturan. Povas partopreni en ĝi ĉiuj personoj, kiuj sin enskribigis aŭ enskribigos kiel membrojn de la Societo por la jaro 1900.

La lasta n-ro de „L' Espérantiste“ konigas la rezultatojn de la 1-a konkurso literatura. Pensante ke tio ĉi interesas ankaŭ niajn legantojn, ni komunikas la nomojn de la premiuloj:

Unua sekcio: *1-a premio ex oequo*: s-ro S. Meyer, pro „Pri la diveno kaj aliformiĝo de la lingvaĵo“, kaj fr-ino Hilda Cederblad, pro „Norde de la polusa cirklo“; *3-a premio*: s-ro Paul de Lengyel, pro „Bonan nokton, kara Margareto“; *honora cito*: s-ro Magnus Nordensvan, pro „Inter tomboj“.

Dua sekcio: *Ekster konkurso*: s-ro S. Meyer, pro „Malserioza kaj senpripensa“; *1-a premio*: fr-ino Zabilon d'Her, pro „La Zuzuaj virinoj“; *2-a premio*: s-ro Elbèr No, pro „La lango“; *3-a premio*: s-ro Axel Hasselrot, pro „La historio de kelkaj sunradioj“.

Ni rekomendas al niaj legantoj ne sole aliĝi al la Societo por la propagando de Esperanto en Francujo, sed ankaŭ par-

topreni en la *konkurso literatura*, — se ili sufiĉe konas nian lingvon. Se ili ne plene konas ĝin, ili perfektigu sin, tiel ke ili povos honore partopreni en venonta jaro.

La adreson de la Societo oni povas legi sur la paĝo 59-a de L. I.

### EL HUNGARUJO.

— La hungara ĉiutaga gazeto „Magyar Állam“ en Budapeŝto, kiu skribis tre simpatian artikolon antaŭ du monatoj pri nia lingvo (vidu la n-ro 3 de L. I.), presis la sekvantan artikolon en sia 169-a numero (27. VII):

„*La lingvo blua*. Ekzistas ankaŭ tia. Ĝia patro estis la Esperanto, kaj ĝia avo la Volapük. (Nek la patron, nek la avon mortbatis ŝnurego de ŝipo,\*) ili mortis [!] per si mem.) Ilia rekta deveninto, kiun oni nur erare baptis je „blua“, naskiĝis en la kanikula monato. Ĝia majstro, Ditort Bolak, el Parizo sendis al ni la grammatikon (kaj en bela lingvo germana: *Blaue Sprache*). Oni diras, ke tiu ĉi homo nenian malsanon havis ankoraŭ antaŭ kelkaj tagoj.“

\*

— Pri la mondlingvo nomata „*Esperanto*“: Artikolo skribita en la numero II (februara) 1899 de la hungara lingvosciencia monata gazeto „*Nyelvör*“ per Ludoviko Katona, al kiu la nove aliĝinta fervora esperantisto s-ro *Adolf Altenburger* dediĉas la recension sekvantan:

La verkisto en sia konfuzega artikolo atakas la lingvon „*Esperanto*“, sen ke li pruvus sian kontraŭan opinion. Jen liaj ofte kontraŭdirantaj eldiraĵoj:

\*) Novelo por la junularo verkita de la granda hungara verkisto Jókai komenciĝas tiel: „Lian patron mortbatis ŝnurego de ŝipo“. Tiun ĉi verkon bone konas ĉiu klera hungaro. La supre citita artikolo aludas tiun ĉi verkon.

L.

1) Li konfesas la neceson de mondlingvo, ĉar li skribas: „La scio de pli multaj lingvoj neniel estas la mezurilo de la civilizeco, eĉ ne estas al ĝi senkondiĉe necesa. Sed kontraŭe estas vera, ke la scio de lingvoj profundigas kaj precipe larĝigas la civilizecon. Do aliparte estas ankaŭ sendube, ke ni multegon da tempo povus ŝpari kaj por pli utila afero uzi, se ni ne devus 5—6 lingvojn el-lerni, ke ni povu legi la literaturon de aliaj popoloj. Por la ne-lingvisto la lerno de lingvoj estas efektive malŝparo de tempo. Estus vere en multegaj okazoj nekalkulebla gajnaĵo, se oni per internacia unuigo devigus la homaron uzi unu internacian komunikan lingvon.“ — En alia paĝo li diras: „Estas du sendubaj veraĵoj: 1. ke la mondlingvo, aŭ pli rekte internacia komunika lingvo estas tre dezirinda kaj estus granda beno, por ke la tuta homaro povu unu kun alia en ju pli vastegaj limoj ĉiam plu komuniki; — 2. ke la disvastigo de tia modesta mondlingvo kvankam estus tre malfacila, tamen ne estus neefektivebla.“

2) Li tamen opinias, ke la lingvo Esperanto ne povus fariĝi la mondlingvo. Kial ne? Li ne diras. Li nur mokas la amikojn de Esperanto, dirante: „La kluboj kaj gazetoj fonditaj por la disvastigado de l' Esperanto kaj tuta la literaturo Esperanta nur la naivajn homojn povas delogi. De tiaj ĉi naivaj amuzaĵoj ni ne povas pli multon atendi, ol de la „*Volapük*“. Kelkajn entuziasmajn homojn en niaj tagoj oni eĉ por malpli seriozaj celoj povas facile varbi. Certe ĉe la pli granda parto de tiaj ĉi adeptoj la pajlafajro baldaŭ malbrulas; ju pli granda estis komence la flirtado de la flamo, des pli rapide ĝi ĉesas bruli.“

3) Li tamen konfesas, ke Esperanto superas la lingvon Volapük. Li skribas: „La gramatikaj reguloj estas simplaj. Tial la Esperanto iom pli proksime staras al la ankoraŭ ĉiam malproksima idealo de la mondlingvo, ol la Volapük.“

4) La diversaj mondlingvo-provoj laŭ la verkisto „suferadas en grandega kulpo, ĉar ili volas samtempe en du kontraŭaj vojoj kuri, kio nature maleblaĵo estas. Unuparte ili klopodas atingi la plej grandan simplecon, por ke la tuta homaro povu ellerni ilin kun la plej malmulta penado. Aliparte tamen ili ĉiam fanfaronas, ke ili je bonsono, riĉeco de nuanco kaj la forteco de la esprimo estas similaj al la naciaj lingvoj. Tial ĉiuj, eĉ la entuziasmaj adeptoj de la Esperanto per ju pli belaj tradukekzemploj volas sian artefaritan lingvon disvastigi. Do tio ĉi estas peno tute malnecesa kaj senfruktema. Homerono, Shakespeare kaj Heine estas domago en tiajn ĉi artefaritajn lingvojn devigi, ĉar tia entrepreno povas havi nur ridindajn rezultatojn. Estos sufiĉe, se iam ia feliĉa cerbo tian elporteblan interkomunikan lingvon faros, en kiu pri la plej ordinaraĵoj povas paroli sen pli granda malfacileco du sufiĉe sagacaj filoj de la diversaj eŭropaj nacioj.“ Alia kulpo de la mondlingvoj laŭ s-ro Katona estas, ke „ili en la kolektado de la vortaro el intenco de la lernfaciligo tian ĥaŝon de la vortoj kunmiksas, ke vera babelaj lingvokonfuzo el ili fariĝas.“

5) La lingvo Esperanto laŭ la verkisto ne fariĝos vera internacia lingvo. Li diras: „Ĝis tiu tempo, kiam en la estonteco ekscelente granda spirito donacos al la mondo ĝenialan mondlingvon, ankaŭ la provo de d-ro

Zamenhof estas nur pia intenco, kiel la aliaj similaj provoj. Ankaŭ tiu ĉi havos nur tian mallongan vivon, kian la Volapük. Estas eble iom pli bona, eĉ pli bela, ol la Volapük estis, — kvankam la beleco ne tuŝas la esencon de la afero, — sed tamen ne havas kaj ne povas havi pli da espero pri la sukceso, ol ĉiuj siaj antaŭuloj, kiuj naskiĝis kun ĝi el unu sama fonto. Tiu ĉi kulpa fonto estas: la diletantismo, por kio tiuj ĉi lingvoj malgraŭ la volonta reklamo de la ĵurnaloj ne povas ekzisti plu, ol unu-du jardekoj, kaj eĉ en tiu ĉi tempo malmulte disvastiĝas.“

6) La latina lingvo devas transformiĝi en lingvon internacian! Jen la vortoj de la verkisto: „Por tiu ĉi celo (por internacia interkompreniĝo) mi ankaŭ hodiaŭ ne konas pli bonan kaj konvenan lingvon, ol la latinan. La vortotrezoro povus resti la tuta antikva kaj nova latina vortaro kun la elementoj eĉ barbaraj de la sciencoj diversaj. La konjugacion kaj deklinacion oni eĉ tute povus elpuŝi *imitante la Esperanton* (!).“

„Tial en la nunaj cirkonstancoj anstataŭ la Esperanto, — kiu do havas malmultan esperon je la venko, — lernu ni la latinan lingvon. Ĉar en tiu ĉi lingvo eĉ en sia hodiaŭa formo ni povas kun pli multaj homoj komuniki, ol per la helpo de la Zamenhofa lingvo. Kiuj tamen havas tempon por lernado de aliaj lingvoj fremdaj, tiuj lernu — anstataŭ la parkerlernado de la Esperanta vortaro — tiom same da anglaj, francaj aŭ italaj vortoj, per kiuj kune kun malmulta montrado oni eĉ sen gramatiko povas interkomuniki.“

\*

— En la antaŭlasta (XVII) volumo de la granda hungara leksikono, presata

en 1900, estas bona artikoleto pri „Esperanto“, kiun ni, dank' al s-ro Altenburger, tie ĉi Esperante komunikas:

„*Esperanto* estas provo de mondlingvo, per kiu post la malsukceso de la Volapük novtempe la rusa scienculo Zamenhof volas la demandon solvi. Li el la plej uzataj latinaj, germanaj, francaj, anglaj kaj italaj vortoj kunmetas sian vortaron kaj ilin kun 30 sufiksoj kaj prefiksoj ŝanĝadas, tiel ke la radikoj de la lingvo estas tre malmultnombraj, kio la lernadon tre faciligas. Ĝia gramatiko estas tre simpla, (Nun sekvas ekzemplo de la deklinacio kaj konjugacio.) Ĝia sonado estas simila al la itala kaj sufiĉe agrabla. La italan lingvon rememorigas ankaŭ multaj sonoj (ekzemple: ĵ, ĝ, ĉ kaj ŝ) kaj la akcentado. Ĉe ni Abel Barabás, Kolojvára ĵurnalisto, estas unu el ĝiaj plej entuziasmaj batalantoj. Ankaŭ li skribis en 1898 la hungaran Esperantan gramatikon.“

#### EL RUSUJO.

— Societo „Espero“ en S. Peterburgo sendis la sekvantan raporton:

La 4/17-an de aprilo la membroj de Espero aranĝis komunan kunvenon publikan en salono de l' Imperiestra Geografika Societo. Alestis efektivaj membroj: I. Becker, K. Ostanieviĉ, V. Rogaĉev-Antonov, N. Aleksejev, V. Kurmanajev, V. Vinnicki, I. Rudziŝ kaj kelkaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne fariĝis membroj de Espero. La kunvenintoj konfirmis la raporton kasan por la pasinta 1899-a jaro; ĝi prezentas sekvantajn sumojn:

Restaĵo en la kaso de 1898. j.	12 r. 35 k.
Enspezoj dum la 1899. j.	399 r. 40 k. 411 r. 75 k.
Elspezoj dum la 1899. j.	372 r. 12 k.
Restas en la kaso	39 r. 63 k.

krom tio Espero havas kapitalon en libroj, meblo kaj cet. havaĵo, kiu estas 572 r. 56 kop.

La plej interesa parto de la kunsido estis legado de „Pekoj Presaj“, kiun faris s-ro K. Ostanieviĉ. Por tio li kolektis la plej malsaĝajn artikolojn pri Esperanto, kiuj estis presitaj en diversaj rusaj gazetoj dum la lasta tempo. Kelkaj artikoloj estis tute legataj, el la plej malsaĝaj do s-ro Ostanieviĉ citis nur kelkajn rimarkindajn eldirojn, kaj ĉiu gazeto ricevis aparte juĝon por sia artikolo. Ĝi nature elvokis iom da disputo kun gazetistoj alestintaj kaj la rezultato de tiu ĉi disputo estis nature bona por nia lingvo,

La kunveno elektis kiel honorajn membrojn de Espero la sekvantajn personojn: Max Müller, D-ro Daniele Mariognoni, G. Moch, D-ro Bogdanov (Diodono), Paul de Lengyel, H. Geoghegan, Cl. Adelsköld, D-ro I. Ostrovski, P. Levdik — redaktoro de la „Peterburga Gazeto“ — kaj J. Ŝlejer — kreinto de la Volapük. Samtempe estis elektitaj kiel membroj de Espero nove aliĝintaj 53 personoj.

Oni decidis proponi al ĉiuj membroj partopreni en la fotografa grupo de la esperantistaro, por kiu celo oni petis ĉiujn membrojn sendi siajn fotografaĵojn al „Espero.“

La sekvintan tagon multaj Peterburgaj gazetoj presis artikoletojn pri tiu kunveno, kaj tiuj artikoloj parte parolis por Esperanto, kelkaj rilatis neŭtrale, tamen la gazetoj ne diris eĉ unu vorton kontraŭ Esperanto.

Multaj personoj, elektitaj kiel honoraj membroj de Espero, sendis al ĝia komitato leterojn kun fotografaĵoj siaj. Por elekti s-ron Ŝlejer kiel honoran membron



Espero havis la celon montri, ke sinjoro Ŝlejer, kiel ni esperantistoj-ano de la sama ideo, faris multe por ĝi kaj Espero devis per ia maniero esprimi al li sian estimon. Sed s-ro Ŝlejer resendis al Espero la honoran bileton kun surskribita vorto „*refuse*“ kaj kun folieto presita, kiu penas montri al ni, ke laŭ la artikoloj de gazetoj de 1890. jaro Volapük estas bonega kaj „multe uzata“ lingvo!

— La membroj de la Komitato de Espero kunvenis la 7/20-an de aprilo kaj decidis sendi 70 cirkulerojn hektografitajn al la plej konataj gazetoj kun propono konatigi al la legantoj nian lingvon per artikoloj, kiuj estas riceveblaj de Espero. La rezultato estis tiu sekvanta: la Peterburga germana gazeto „*Herold*“ presis ĉiujn artikolojn kiujn ĝi ricevis de Espero, la Peterburga ĵurnalo „*Sevjer*“ (Nordo), la Odessa gazeto „*Novorossijski Telegram*“ kaj unu gazeto en urbo Pskov presis artikolojn kun la gramatiko Esperanta.

— „Espero“ sendis vitromeblon kun libroj kaj propagandfolioj al la Ekspozicio Pariza; ĝi nun staras en la I-a grupo de la rusa sekcio de l'ekspozicio kaj havas la n-ron 686. Tiu ĉi entrepreno postulis ĉirkaŭ 200 rublojn, kiujn Espero ricevis prunte ĉe s-ro Ostanieviĉ; kaj Espero faris nur la plej necesan, kion ĝi povis fari havante tiom malgrandan rimedon.

Kelkaj esperantistoj diras, ke la partopreno en la ekspozicio estas preskaŭ vana kaj tute senutila por Esperanto, sed ni nun vidis la kontraŭan. Pri tiu partopreno nia multaj Peterburgaj gazetoj kelkfoje presis artikolojn, rigardante „Esperon“ kiel societo havanta eksterordinaran celon kaj

tiamaniere ni havis ioman reklamon, kiu ĉiam estas bona kaj utila por ni. Krom tio ĵus ni sciigis, ke en la Ekspozicio estas nun eksponata „la lingvo blua“ (Bolak), nova projekto por lingvo internacia. Ĉe tia cirkonstanco mi ne kredas ke la ago de Espero estis senutila kaj vana. Laste ricevita letero de s-ro L. de Beaufront avizis nin, ke la vitromeblo estas nun tute aranĝita.

V. ROGAĈEV-ANTONOV

membro de la Komitato de „Espero“.

\*

— En letero, kiun ni bedaŭrinde ĝis nun pretervidis, datita je la 23-a de aprilo lasta, s-ro V. Tacievski skribis al ni: „Mi havas la ĝojon sciigi vin, ke s-ro N. Balabuĥa, redaktoro de l'gazeto „*Krim*“, estis tiel bona allasi la kolonojn de sia gazeto por ĉiusemajnaj artikoloj pri Esperanto. Kelke da artikoloj jam estas enmetitaj.“

## EL SVEDUJO.

— Oni vidas en alia kunteksto en tiu ĉi numero, ke la gazeto „*Vårt Land*“ (n-ro 175) esprimis la penson pri la oportuneco de Esperanto por la interkompreniĝo de l'eŭropanoj en Ĥinujo.

\*

— N<sup>o</sup> 166 de l'gazeto „*Ny Tid*“, eldonata en Göteborg, sub la rubriko „*Literaturo*“ donas malgrandan sciigon pri la enhavo de nia n-ro 3-a.

\*

— La lingva konfuzo en Ĥinujo. Pri tio ĉi oni legas en la sveda gazeto „*Vårt Land*“ N<sup>o</sup> 175 (30. VII) la sekvantan:

„La unuigita agado de la eŭropaj grandpotencoj, de la amerikanoj kaj de la japanoj en Ĥinujo estas malfaciligata pro la multaj diferencaj lingvoj. Tiel oni rakontas, ke dum la batalo ĉe Tientsin, la 13-an de julio, la japana generalo Fukiŝima sendis sciigon al la angla generalo Dorward kun peto pri helpo. La sciigo estis tamen nekomprenbla — eble skribita en „piĝin“ — kaj la alportinto komprenis sole japane. Nun Dorward sendis kurjeron por serĉi la japanan generalon kaj demandi, kion li deziras, sed la kurjero, sciante paroli nur angle, ne povis trovi sin en ordo ĉe la japanoj kaj neniam renkontis la generalon. Tia sama malfacilaĵo ŝajnas prezenti sin ĉie, nenia nacio povas komunikiĝi kun alia. Se efektiviĝu la Unuigitaj Ŝtatoj Eŭropaj, do la lingvaj lernadoj de la militistoj sendube devas esti kondukataj kun pli da seriozeco, tiel ke ĉiu parolu almenaŭ ses lingvojn — anglan, francan, germanan, italan, rusan kaj japanan. — Aŭ eble plej oportune — Esperanton.“

Rilate al tiu ĉi demando ni ricevis de unu el niaj legantoj la leteron sekvantan:

„Nyon, Svisujo, 17 julio 1900.

Estimata s-ro Redaktoro!

Se tio ne estas jam farita, mi proponas al vi presi en la venonta n-ro de „L. I.“ instigi la esperantistojn de ĉiu lando, precipe la alte situaciitajn, tiel oficiroj kaj profesoroj, sendi al la respekta ĉefmilitisto ekzemplerojn da lernolibroj nacialingvaesperantaj, al ili dirante, ke per tiu rimedo la internaciaj batalantoj en Ĥinujo povus rapide interparoli, almenaŭ la oficiroj, por la plej bona sukceso de tia entrepreno. La esperantistoj, kiuj povus sendi ankaŭ rekte

lernolibrojn al la oficiroj iliaj samlandanoj en Ĥinujo, farus ankaŭ tre bone; nenie kaj neniam lingvo internacia povus sukcesi pli utile.

Kun kora saluto

C. F. 4085.“

Ĉio konstatas la bezonon de lingvo internacia, kaj ke la militistaroj estas nova kampo por nia paca propagando Esperanta.

## EL BOHEMUJO.

— Bibliografio. Světová řeč „Esperanto“. Cena 6 h. Val. Meziříčí 1900. Nákladem Th. Čejky v Bystřici p. H.

Tiu ĉi verko, kiun eldonis s-roj M. Daníček kaj Th. Čejka, estas la bohema traduko de la propaganda broŝureto N° 86. Ĝi estas enskribita en la nomaro de Esperanta literaturo sub la numero 133.

Tiom, kiom la redaktoro de „L. I.“ povas prijuĝi la fremdlingvan verkon, ĝi ŝajnas esti bonege farita. La eksterajo de la broŝureto estas ankaŭ bele aranĝita.

En malgrandaj notetoj sur la paĝoj 9-a kaj 26-a oni legas la sciigon, ke plena lernolibro kaj ekzercaro kun du vortaroj por bohemoj elvenos en aŭgusto de 1900.

Se ni ĝuste konas, ĝis nun elvenis nur unu verko bohema pri Esperanto, nome la lernolibro de s-ro Fr. Vl. Lorenc, publikigita en 1890 sub la numero 39 en la nomaro.

Ni salutas kun ĝojo la novan aldonon al la propaganda literaturo de nia lingvo.

Oni povas akiri la verkon, — kies prezo estas 6 heleroj, — ĉe la sekvantaj personoj: s-ro Fr. Šídlo, učitel

měšt'anské školy (instruisto de l' burĝa lernejo) en Bystřici pod Hostýnem; s-ro Th. Čejka, učitel (instruisto), la antaŭa adreso; s-ro Jan Holub, učitel, en Veřovicích u Frenštátu p. Radhoštěm, — ĉiuj en Bohemujo; — s-ro Mat. Daníček, učitel, en Znorovách u. Veselí; s-ro Valent Bílík, učitel, la sama adreso, — ambaŭ en Moravujo.



## La infantino.\*)

(Portugala popola romano.)

En ĝardeno l' infantino  
Sidis ĉarma kiel flor',  
En la bukloj brilis hele  
La kombil' el pura or'.  
Ŝi rigardis al la ŝipoj  
Sur la blua ocean':  
Ĉe la bordo ĵetis ankron  
Brava viro kapitan'.  
„Ĉu vi vidis, kapitano,  
Mian bonan edzon? Li  
Estas en la Sankta Lando  
Ĉe la tomb' de l' Fil' de Di'.“  
„Mi tre multajn kavalirojn  
Tie vidis, sinjorin', —  
Kiaj estas liaj signoj  
Kaj armiloj, diru min.“  
„Li sur nigr-ĉevalo rajdas,  
Plena je kuraĝ' en kor',  
Sur la brila ponardego  
Estas bela kruc' el or'.“  
„Ha, ĉi tiu kavaliro  
Sur ĉi tiu nigr-ĉeval'

Falis tie, mi lin venĝis  
De nelonge en batal'.  
„Ve, ho ve! mi malfeliĉa!  
El la tri filinoj mi  
Ĝis hodiaŭ eĉ ne unu  
Edzinigis, granda Di'!“  
„Kion donus vi, se mi  
Portus lin al via kor'?“  
„Ha, mi donus or-juvelojn,  
Keston da brilanta or'.“  
„Mi juvelojn ne bezonas,  
Oron ne bezonas mi,  
Kion donus vi, se mi  
Lin alportus tien ĉi?“  
„Tri perfektajn muelilojn  
Donus mi kun ĝoja kor':  
Du por lino, kaj la tria  
Por cinamo, bon-sinjur'.  
Ha, la reĝo mem, li ĝojus  
Ilin, mi konvinkas vin.“  
„Muelilojn mi ne volas,  
Mi ne volas, sinjorin'.  
Kion donus vi, se mi  
Portus lin al via kor'?“  
„Ha, mi donus bel-tapiŝon,  
Mi trakudris ĝin per or'.“  
„Mi tapiŝon ne bezonas  
Mi ne volas tion ĉi;  
Kion donus vi, se mi  
Lin alportus nun al vi?“  
„Mi la tri filinojn belajn  
Al vi donus, nobelul':  
Du el ili por vi kudrus  
Ĉian veston laŭ postul', —  
Kaj la tria, la plej bela,  
Estus al vi bon-edzin'.“  
„Mi ne volas la fraŭlinon,  
Mi ne volas, sinjorin'.  
Kion donus vi, se mi  
Lin alportus nun al vi?“  
„Ve ne estu postulema,  
Plu nenion havas mi!“

\*) Titolo de reĝaj filinoj en Portugalujo kaj Hispanujo.

„Sinjorino, al mi donu,  
Donu vi vin mem al mi!“  
„Fi, senhonta kavaliro  
Kun malĉasta krimea klin’!  
He, servantoj, venu, kaptu,  
Ligu per ŝnuregoj lin!  
Ligu vi lin al ĉevalo,  
Kaj pereu li sub ĝi;  
Servantaro, venu ĉiuj,  
Rapidegu tien ĉi!“  
„Sinjorin’, mi disduigis  
Mian ringon: jen duon’,  
Kie estas la restinta,  
Diru, mia bela kron’?“  
„Ha! mi longe, edz’ amata,  
Vin atendis kun obstin’.  
Kiom vi min turmentegis,  
Ha, ke Di’ pardonu vin!“

Tradukis

D-ro Costa e Almeida kaj A. Kofman.



## La elefantido.

Rakonto de Rudyard Kipling.

(Kipling verkas por Amerika virina gazeto serion da novaj historioj, el kiuj la malsupre citata estas la unua.)

Jes, vi sciu, miaj amikoj, ke en antikvaj tempoj la elefanto havis nenian rostron; ĝi havis nur dubenigran, ŝtipecan nazon, laŭ la grandeco kiel boto. Tiu ĉi nazo povis fleksiĝi antaŭen kaj malantaŭen, sed por per ĝi preni ĝi ne taŭgis.

Estis juna elefanto, juna iu, unu elefantido, kiu estis tiel terure scivola, ke ĝi demandadis pri ĉio inter ĉielo kaj tero. Ĝi loĝis en Afriko, kaj ĝi plenigis la tutan landon per siaj demandoj. Sian onklinon la struton ĝi demandis, kial ŝiaj vostplumoj kreskas precize en tia maniero; kaj tiam ĝi

ricevis bataron per ŝia malmola ungego. Ĝi demandis sian onklon la girafon, kio faris ties haŭton tiel makula, kaj la onklo donis al ĝi baton per sia ŝatinda hufo; sed tiom same scivola estis malgraŭ ĉio la elefantido. Ĝi demandis sian alian onklinon, la hipopotamon, kial ties okuloj estas tiel ruĝaj, kaj tiam ĝi ricevis respektindan baton kiel respondon; sian alian onklon, la simion, ĝi demandis, kial la melonoj gustas tiel, kiel ili faras, kaj la simio bategis ĝin per sia kruda, kruda mano; kaj tamen la elefantido daŭrigis esti tiel terure scivola. Pri ĉio, kion ĝi aŭdis, vidis, tuŝis, gustumis, aŭ en alia maniero kontaktis, ĝi faris demandojn, kaj ĉiuj ĝiaj onkloj kaj onkloj punis ĝin por tio; sed tio ĉi en nenia maniero malfortigis ĝian teruran scivolecon.

En unu bela mateno, kiam vekigis la elefantido, ĝi estis trovinta novan demandon, kiun ĝis tiu horo ĝi neniam prezentis.

— Kion la krokodilo prenas por tagmanĝo? — demandis ĝi.

— Silentu! — kriis la familio ekscitite, kaj tiel la ido ricevis bataron.

Iom post iom ili estis pretaj pri tio ĉi, kaj tiam la elefantido ekvidis la piprobirdon, kiu sidis sur branĉo en la proksimo rigardante. Tuj ĝi foriris al tiu ĉi kaj diris:

— Mia patro donis al mi punon, kaj tion ankaŭ faris mia patrino kaj ĉiuj miaj onkloj kaj onkloj, tial ke mi estas tiel terure scivola; sed ne tiom malpli mi volas scii, kion la krokodilo prenas por tagmanĝo.

— Iru al la bordo de la granda griz-verda, ŝlima rivero Limpopo, kie la februarboj kreskas, kaj vidu mem, — respondis filozofe la birdo.

Fine en la sekvinta mateno la scivola elefantido prenis cent funtojn da bananoj, cent funtojn da sukerkanoj kaj deksep melonojn kaj diris al la familio:



— Adiaŭ, nun mi iras al la bordo de la granda grizverda, ŝlima rivero Limpopo, kie la febroarboj kreskas, por vidi, kion la krokodilo prenas por tagmanĝo.

La familio donis al ĝi serion da bataro en adiaŭ, ĉar tio kutimas esti „sukcesiga“, post kio la ido komencis la iradon, iom varma eble, sed alie tre trankvila; en la vojo ĝi manĝis melonojn kaj ĵetis la ŝelojn post si.

Ĝi iris nun de la urbo de Graham al Kimberley kaj de Kimberley al la lando de Khamos kaj de tie nordorienten, ĝis ĝi alvenis al la granda, grizverda, ŝlima rivero Limpopo, kie la febroarboj kreskas, tute kiel diris la piprobirdo.

Sed nun vi memoru, ke ĝis tiu tago mem la elefantido neniam vidis krokodilon; ĝi ne havis antaŭsenton pri tio, kiel elvidas unu tia, sed estis tio mem, pri kio ĝi estis scivola.

La unua estaĵo, kiun ĝi trovis, estis makula boao, kiu kuŝis kunruliĝinte sur peco da ŝtonego.

— Mi petas pardonon, — diris ĝentile la elefantido, — sed ĉu vi eble ne vidis iun krokodilon?

— Ĉu mi vidis krokodilon? — diris la makula serpento kun malestimoplena ekĵeto de la kapo; — sed vi eble ne volas esti tiel aminda diri al mi, kion proksimavice vi intencas demandi?

— Jes, senkulpigu! — diris la juna elefanto ĝentile, — kion ĝi prenas por tagmanĝo.

La serpento sin elruligis, ĵetis sin kvaŭ la fulmo malsupren de la ŝtonego kaj komencis energie „striigi“ la elefantidon per sia malmola vosto.

— Estas ridinde, — diris la elefantido, — sed ĉar mia patro kaj patrino, — por ne paroli pri ĉiuj miaj onkloj kaj onkloj, — trabatadas min tial ke mi estas tiel terure scivola, sekve mi supozas, ke vi faras tion pro la sama kaŭzo.

Post tio ĝi tre ĝentile diris adiaŭ, helpis la serpenton reiri denove sur la ŝtonegon kaj iris plu, iom varma, certe, sed ne laca, ĝis ĝi ekpaŝis sur io, kion ĝi konsideris esti trunko de arbo, kuŝanta apud la bordo de la rivero, kie la febroarboj kreskas. Sed tio ĉi estis ĝuste la krokodilo, miaj amikoj, kaj tiu ĉi ekpalpebrumis per unu okulo.

— Pardonu, — diris bonedukite la elefantido, — sed ĉu vi eble ne vidis krokodilon en tiuj ĉi regionoj?

Tiam la krokodilo palpebrumis per la alia okulo kaj levis la kolon el la ŝlimo, dum kio la elefantido rapide retiris sin malantaŭen kelkajn paŝojn, ĉar ĝi ne volis precize nun ekhavi pli da bategoj.

— Alvenu, vi malgranda! — diris la krokodilo, — kial vi tion demandas?

— Jes, — diris la elefantido ĝentile, — senkulpigu min, sed mia patro kaj patrino — por ne paroli pri miaj onkloj kaj onkloj kaj makula serpento ĵus, — batis min tiel terure, tial ke mi estas scivola, kaj pro tio vi povas kompreni, ke mi ne volas ekhavi pli jam.

— Venu al mi, vi malgranda, — diris la krokodilo, — mi estas tiu, kiun vi serĉas.

Kaj tiam ĝi ploris krokodilajn larmojn por montri, ke tio estas vera, kion li diris.

La elefantido preskaŭ ekperdis la spiron; kun batanta koro ĝi genufleksis sur la bordo kaj diris:

— Vi estas la granda persono, kiun mi serĉis tiel longtempe. Ĉu vi ne volas esti bona diri al mi, kion vi prenas por tagmanĝo?

— Alvenu, vi ĉarmuleto, — diris la krokodilo, — kaj mi subdiros ĝin en vian orelon.

Solene kaj kun batanta koro la elefantido klinis sian kapon dense malsupren al la mialgalodora faŭko de l'krokodilo, dum kio la krokodilo makzelokaptis ĝian grandan nazon, kiu ĝis tiu ĉi semajno, tago, horo kaj minuto estis ne pli granda ol boto, sed multe pli utila.

— Mi pensas, — diris la krokodilo inter la dentojn, — mi pensas, ke ni volas hodiaŭ komenci per elefantido.

Tiam, miaj karaj amikoj, la elefantido tute terurigis kaj spirblovis ion tra la nazo, kio similis la sekvantan:

— Dankon al vi, tio ĉi iras iom tro subite!

Tiam la makula serpento rapidis mal-supren al la rivera bordo kaj diris:

— Mia juna amiko, se vi ne retiras nun en tiu ĉi momento tiom kiom vi povas, tiam estas mia supozo, ke via konatigo kun tiu ĉi grandkvadrata ledpalto\*) kondukos vin suben en la riveron, antaŭ ol vi havos la tempon diri eĉ Jack Robinson.

Tiel nome kutimas paroli la makula serpento de ŝtonego.

Kaj tiam la elefantido sidiĝis sur sia mal-granda vosto kaj tiris kaj tiris kaj tiris. Kaj la krokodilo baraktis en la akvo, tiel ke ĝi fariĝis tute blanka, kaj ankaŭ tiu tiris kaj tiris kaj tiris. La nazo de la elefanto komencis streĉiĝi kaj ĉe ĉiu ektiro ĝi fariĝis pli longa, kaj tio terure doloris.

Kiam la elefantido rimarkis, ke la piedoj komencas ŝanceliĝi sub ĝi, ĝi ekkriis tra la nazo, kiu jam fariĝis je ĉirkaŭe 5 futoj longa:

— Nun mi ne povas plu!

En tiu sama momento la serpento metis paron da kurboj de sia korpo ĉirkaŭ la postajn piedojn de l' elefanto kaj diris:

— Vi sentimema vojaĝanto, ni nun serioze unuigu niajn fortojn en bravan agon, ĉar se ni tion ne faros, estas mia firma konvinko, ke tiu ĉi memmova militŝipo kun la kirasita supra ferdeko (kaj per tio ĉi, miaj amikoj, ĝi volis diri la krokodilon) detruos por ĉiam vian estontan karieron.

Kaj, dume, ĝi tiris, kaj la elefantido tiris, kaj la krokodilo tiris; sed la elefantido kaj la

makula serpento tiris plej forte, kaj fine la krokodilo eklasis la nazon de l' elefantido kun krako, kiu estis aŭdita tra la tuta Limpopo.

La elefantido eksidiĝis iom malmole kaj subite, sed unue ĝi diris tre ĝentilan dankon al la serpento, kaj poste ĝi tre zorgeme enpakis sian nazon en freŝajn foliojn de banano kaj trempis ĝin en la grizverda, ŝlima rivero Limpopo por iom ĝin malvarmetigi.

— Kial vi tiel faras? — demandis la makula serpento de ŝtonegoj.

— Senkulpigu, — diris la elefantido, — sed mia nazo tute perdis sian formon, kaj mi provos, ĉu la streĉo ne povus iom retiriĝi.

— Tiam vi povos devi longe atendadi, — diris la makula serpento. — Kelkaj nepre ne volas vidi tion, kio estas por ili bona, — aldonis ĝi.

Tri tagojn la elefantido sidadis atendante ke la nazo plimallongiĝos, kaj ĝi fine fariĝis strabokula rigardegante senĉese la nazon, kiu tamen daŭrigis esti tiel same longa; ĉar vi povas ja kompreni, miaj amikoj, ke la krokodilo eltiris ĝin je efektiva rostro, precize tia, kian en nuna tempo havas la elefantoj.

En la fino de la tria tago muŝo venis flugante kaj ekpikis la elefantidon sur ĝia ŝultro. Subita kiel la fulmo ĝi levis la rostron kaj mortigis la muŝon per ĝia ekstrema fino.

— La profito de numero unua, — diris la makula serpento; — tion ĉi vi neniel povis fari per via antaŭa peco de nazo. Provu nun ion manĝi.

Antaŭ ol ĝi sciis, kion ĝi faras, la elefantido etendis sian rostron kaj deŝiris per ĝi grandan faskon da herbo, elbatis el ĝi la polvon kaj metis ĝin en la buŝon.

— La profito de numero dua, — diris la serpento; — tion ĉi vi neniam povis fari per via ŝtipnazo. Ĉu vi ne pensas, ke la suno brulas varme tie ĉi?

— Jes, ĝi faras, — diris la elefantido, kaj

\*) Palto = lana supervesto por vojaĝantoj.  
Parenteza rimarko de l' tradukinto.

antaŭ ol ĝi klare sciis, kion fari, ĝi kaptis per la rostro grandan bulon da ŝlimo el la rivero kaj ĵetis ĝin sur sian kapon, de kie ĝi gutis malsupren laŭ la oreloj.

— La profito de numero tria, — diris la makula serpento; — tion ĉi vi ne povis fari per via antaŭa nazo. Nu, ĉu vi ne sopiras ricevi jam iom da batado?

— Ne, senkulpigu min, tion mi ne faras, — respondis la elefantido.

— Kiel plaĉus al vi, se vi povus doni bataron al aliaj?

— Ho, tio tre plaĉus al mi, — respondis ĝoja la elefantido.

— Bone, — diris la serpento, — tiam vi vidos, ke via nova nazo estas tre bona por tiu ĉi celo.

— Grandan dankon, — diris la elefantido, — tion mi memoros; mi pensas, ke mi volas tuj iri hejmen por provi.

Foriris tiam la elefantido hejmen tra Afriko, gaje svingante la rostron. Kiam ĝi volis havi fruktojn, ĝi kolektis tiajn de la arboj anstataŭ atendi, kiel antaŭe, ĝis ili defalos per si mem. Se ĝi volis havi herbon, ĝi deŝiris ĝin per la rostro anstataŭ kuŝi sur la genuoj kaj demordeti ĝin, kiel ĝi devis fari antaŭe. Kiam la muŝoj ĝin pikis, ĝi derompis branĉon kaj uzis ĝin kiel muŝvipilo; kaj kiam ĝi sentis sin sola en sia longa migrado, ĝi kantis por si mem tra la rostro per forto, kiu estis pli potenca ol multaj muzikaj bandoj de blovinstrumentoj.

En la irado ĝi faris nur unu malgrandan flankiron, kaj tio estis por trovi unu hipopotamon (ne la familianon), kiun ĝi trabategis per sia nova rostro, por esplori, ĉu la serpento diris la veron.

La restaĵon de la tempo ĝi amuzis sin kolektante la melonajn ŝelojn, kiujn ĝi estis ĵetinta sur la vojon irante al Limpopo.

Fine ĝi alvenis en unu malluma ves-

pero reen al la familio; ĝi levis tiam la rostron kaj diris:

— Kiel vi fartas tie ĉi?

Tiam ili tre ĝojiĝis ĝin vidi kaj ek-kriis tuj ĉiuj:

— Alvenu kaj ricevu kelke da batoj pro via terura scivoleco.

— Ho, pensu ke ne, — diris la elefantido, — vi sendube ne scias ĝuste sin bati, estas do plej bone ke mi vin instruu.

Tiam ĝi svingis sian rostron kaj trabatadis detale du siajn fratojn.

— Aj! aj! — kriegis ili, — kie vi lernis tiujn ĉi manierojn, kaj kion vi faris el via nazo?

— Mi ricevis novan ĉe la krokodilo sur la bordo de la grizverda rivero Limpopo, — respondis ĝi. — Mi demandis ĝin, kion ĝi prenas por tagmanĝo, kaj tiam ĝi donis al mi tiun ĉi.

— Ĝi estas terura, — diris la simio.

— Jes, precize tia ĝi estas, — diris la elefantido, — sed ĝi estas tre utila.

Tiam ĝi ekkaptis sian onklon la simion kaj ĵetis ĝin meze en abelujon. Post tio la juna elefanto trabategis sian familion tiel longe, ke la familio estis tute terurigita. De sia onklino la struto ĝi deŝiris la vostajn plumojn, sian onklon la girafon ĝi kaptis je ĝiaj postpiedoj kaj trenis ĝin tra dornarbetaĵo, la onklino hipopotamo ne povis dormi en paco post la manĝoj, ĉar ĝi blovis ĉiam al ŝi en la orelojn, kiam ŝi volis dormi; sed al la bonvola piprobirdo ĝi ne faris ion malican.

Fine tio ĉi estis tro varmege al la familio. Unu post unu ili foriris al la rivero Limpopo por ricevi novajn nazojn.

Kiam ili revenis, ili aranĝis grandan feston, kaj post tiu tago ĉiuj elefantoj havas precize tiajn rostrojn, kian la scivola elefantido.


Tradukis P. Nn.




## Rebusoj.

De Ludoviko Mihalovich.

I.



II.



La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la oktobra numero. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administrado de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem. Oni povas ensendi ankoraŭ la solvojn de la rebusoj enpresitaj en la n-roj 3 kaj 4—5.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la N<sup>o</sup> 2:  
I. Nekonata ĉirkaŭaĵo. II. Komuna intereso.  
III. Birdo, ideo, ree, do, o.

Solvistoj la tri rebusojn: Fern. Chauffoureux, N. Pavlovskij, Elbèr No, V. Reiner, C. W. Esp. 4147, Sam, M. M. Abesgus, J. H. Vahtrik, Ludoviko Mihalovich; du rebusojn: K. Ŝidlovski, A. M. Ĥrabrov, V. Gedroic; unu rebuson: Ivan Ŝirjaev.

Ni petas ĉiujn niajn abonantojn ankoraŭ nepagintajn, ili volu havi la bonecon, ensendi la tutjaran abonmonon al la administrado de nia gazeto.

## ANONCOJ.

### UNA HOMO

(22 jaroj), polo, deziras korespondadi kun ia esperantistino, en celo konatiĝi kun ŝi kaj edziniĝi; plena garantio de silentado; seriozajn ofertojn esperantistinoj povas sendadi laŭ la sekvanta adreso: Russie, Vologda, al Aleksandro Zakrĵevski, agento de la lingvo Esperanto, strato Roščenskaja uĝol Galkinskaja, domo de Kirŝina; por sinjoro \*\*

Ĉe la KLUBO ESPERANTISTA en UPSALA estas aĉeteblaj:

**Jarlibro Esperantista 1897**, eldonita de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

**Libro de l' Humoraĵo** de Paŭlo de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 fr.

**R**estantaj jarkolektoj de „Lingvo Internacia“ 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. Kosto: svedaj kronoj 1.50 = frankoj 2.—

**Hjalm. Bäckström**  
Örnsköldsvik (Svedo).

## Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en Svedujo ĉe la Klubo Esperantista Upsala, — en Finnlando ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kosta nur kr. 1 (Fmk. 1:40 p.) po 100, al kio sin almetas la poŝtopago.

**Finlandaj Esperantistoj**, kiuj intencas rajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj ĥemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaĵo prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%. — Postulu kostotabelojn!

**Jyväskylä Rohdoskauppa**  
en JYVÄSKYLÄ.